



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Franclingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

Jarabono : 80 fkoj

P. BABIN
Le Haut des Bourrellières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1997 — 2

(APRIL - MAJO - JUNIO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



Micard estus 100-Jara



Kaj Labirintoj en la Kulturo

KULTURAJ KAJEROJ

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

REDAKCIA KOMITATO:

Jeannine VINCENT
26bis, rue de Milngavie
F-49150 BAUGE

Pierre BABIN
17, rue Romain Rolland
F-85180 CHÂTEAU D'OLONNE

ENHAVO

paĝo

El Grésillon	1
Esperanto tra la mondo (A. Frangeul)	2
Signifoplenaj Strioj (S. Boniol)	3
De Nito al Luto (J.Y; Santerre)	4-5
Kvizo (B. Golden)	6
Labirintoj en la okcidenta kulturo	7
Henri Micard estus 100-jara	8-9
Malpermesita amo (A. Mollison)	10-11
La sekreto de la reĝino (fino)	12-13
Por via Distro - Konkurso	14
La Vivo en Gresillon	15-16

EL GRESILLON

Nova sukceso! Jen titolo por raporto pri la Infan-Renkonto de 1997. Pli ol 40 infanoj diverslingvaj laboris kaj ludis kune. Ne sentiĝis iu manko de la angla lingvo, kiun oni kvazaŭ devige instruas al la geknaboj en multaj landoj, kun evidente magra rezulto. Esperanto ludis sian rolon, tute simple. Ĉu la infanoj ĝuis sian restadon en Grésillon ? Nur rigardu la desegnon apudan. Jen la respondo! Spite al bomboj, ventegoj kaj detruoj miksiĝas la nomoj, kiel manoj. promeso de amikeco espereble nedetruenda. Daŭru tiu etoso, ankaŭ inter la plenkreskuloj, kiujn ili fariĝos.



ESPERANTO TRA LA MONDO

EN LA UNIVERSITATOJ: Okaze de la trideka datreveno de la starigo de katedro pri interlingvistiko kaj esperanto en la universitato Eötvös Lorand (ELTE) de Budapeŝto, pli ol kvardek intervenoj pri diversaj temoj estis faritaj dum la memoriga esperantologia konferenco.

La universitato Adam Mickiewicz, en Poznan, starigas 3-jaran eksteran studadon pri interlingvistiko kaj esperanto. Inter la prelegontoj estos konataj esperantologoj el pluraj landoj.

Post pluraj jaroj de preparoj, la universitato de Santiago de Compostelo (Hisp.), fine anoncas, ke la internaciaj somerkursoj je antaŭuniversitata nivelo, okazos inter la 16-a kaj la 24-a de julio, en esperanto. Temoj 97: poezio de Garcia Lorca, eŭropa juro kaj astronomio. La interesatoj devas enskribiĝi antaŭ la 1-a de julio ĉe Antonio Alonso Nunez, Rosa, 26-5-C, ES-15701, Santiago de Compostela, Hispanio.

En Teherano, Irano, Prof. M.H. Saheb Zamani, konata motoro de esperanto en tiu lando, sukcese prelegis pri esperanto en la ŝtata fakultato Alameh Tabatabai kaj en la lingvistika fakultato Gotbedin Ravandi.

FRANCA ESPERANTO-MUZEO: Fine de aprilo okazis la celebrado de la 20-a datreveno de la franca nacia esperanto-muzeo, en Gray, organizita de la kreinto-direktoro S-ro Géo Junier. Ĉeestis interalie s-ro Zaleski-Zamenhof, nepo de Ludoviko Zamenhof kaj diversaj regionaj kaj naciaj eminentuloj. Ĉeestis cent-kvindek personoj. Bondezira letero estis sendita de Vatikano kaj reprezentanto de la granda rabeno de Francio ĉeestis.

Tiu muzeo estas nepre vizitinda. Adreso: 19, strato Victor-Hugo, 70100-Gray. Kontakti s-ron Géo Junier, 67bis Fg. des Perrières, tel. 03.84.65.11.73.

JAPANIO KAJ KOREIO: Fine de aŭgusto okazos, en Kobe, la 2-a simpozio pri la rilathistorio inter Japanio kaj Koreio, aranĝita de esperantistoj de la du landoj. El Japanio prof. Mizuno Naoki prelegos pri

"Japania kolonia regado kaj azia pacifika milito". El Koreio prof. So Gilsu prelegos pri "kian efikon ankoraŭ postlasas la japana kolonia regpolitiko en la korea popolo". La organizantoj volas labori al pli bona kompreno inter la du popoloj.

LA ETIMOLOGIA VORTARO: Jam en 1997 aperos la kvina kaj lasta volumo de la monumenta verko de Ebbe Voborg: "Etimologia vortaro de esperanto". La kvar jam aperintaj volumoj koncernas la vortojn komenciĝantajn per A ĝis R. Tiu vortaro entenas la oficialan radikaron (fundamenton plus ok aldonoj). Kiel fontlingvoj estas citataj la angla, franca, germana, itala, pola, rusa, latina (la rusa en latinlitera transskribo). La hispana estas ankaŭ citata, kiel la ekvivalentoj en pluraj projektoj de planlingvoj.

"FAME-FONDAĴO": FAME-fondaĵo ebligas realigon de gravaj projektoj por stimuli la internacian komprenadon. Tiu fondaĵo lasttempe helpis la eldonadon de verkoj, studoj aŭ romanoj, aŭ kulturajn manifestaciojn. Adreso: Stefan Maul, Pferseer Str. 15, DE-86150 Augsburg, Germanio.

ESPERANTO EN LINGVO-FESTO: Oni informis pri esperanto kaj demonstracie instruis ĝin en "Lingua Fest", kiu okazis en Tours, Francio, (85 lingvoj, 400 lingvaj aktivaĵoj) kaj en la "Forumo de la mondaj lingvoj", en Toulouse, Francio, dum Pentekosto en kiu oni prezentis ankaŭ multajn idiomojn. Se tiaj manifestacioj estas antaŭviditaj en via urbo, ne manku peti la ĉeeston de esperanto pere de stando, ekspozicio, prelego, fulmkursoj. Vi povos tiel atingi interesan publikon.

PLI OL MIL ESPERANTO-OBJEKTOJ: UEA ĵus eldonis la libron de Hugo Röllinger "Monumente pri esperanto - ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto objektoj". La nomoj "Dr. Zamenhof" aŭ "Esperanto" estis donitaj al stratoj, parkoj, monumentoj en 54 landoj, kaj eĉ al ŝipoj, aeroplano kaj al du asteroidoj. Cetera la listo devus jam esti plilongigita.

SIGNIFOPLENAJ

STRIOJ

Strioj estas ritmo, movo, harmonio, proporcio. Ĉu timigaj, ĉu fascinaj, ili konsistigas signon ne naturan, sed kulturen, eĉ kontrolon. Surobjektaj aŭ surhomaj ili starigas ordon inter la spaco kaj la homo. Kio estas striita, tio estas kreita; sed ĉiam kun strioj io ĝenas kaj konsternas.

Finsomere 1224, post malsukcesa krucmilito, Ludoviko la IX-a reenlandiĝas kaj kune kun li venas karmelanoj kun striitaj manteloj, supozeble laŭ la orienta kutimo. Skandalo! Aĉaĵo! Pluraj sinsekvaj papoj ordonas, ke tiuj fratuloj alprenu unukoloran mantelon; Finfine ili cedas ĉar la urboloĝantoj trudinfluas la prelatojn, por ke la karmelanoj rezignu pri tia skandalonaska vestaĵo. Preskaŭ ĉiujare la klerikaro malpermesas, ke pastroj kaj religiuloj, eĉ laikuloj, uzu striitajn vestojn. Kial tiom da malaprobo?

Unue pro tio, ke strioj estas tre, eĉ tro, videblaj, do malhumilaj, kio ne taŭgas por bona kristano. Due ĉar dum la mezepoko, kiam oni rigardas pentraĵon, oni ĝin konsideras de ties malantaŭa parto laŭ sinsekvaj planoj ĝis la plano plej proksima al la rigardanto. En tia okazo strioj metas porokulan problemon, ĉar oni jam ne nete distingas la diversajn verkoplanajn. El tio fontas la malŝato al la striitaj surfacoj.

Strioj signas honton, malnoblecon; Tiel oni taksas la ĉesulinojn, bufonojn, ĵonglistojn, enkarcerigojn. Fine de la mezepoko kalkuleblas multaj elĵetuloj: ĉu pro malŝatindaj metioj (La supre-menciitaj, la ekzekutistoj), ĉu pro religiaj kialoj (herezuloj, judoj, islamanoj), eĉ la lepruloj, foje la drinkemuloj. Povas okazi, ke oni ŝatas nek la viandistojn, nek la muelistojn, tial ke ili laŭdire malsatigas la popolon. Sur la pentraĵoj aŭ en la rakontoj la hipokrituloj kaj perfiduloj surhavas striitajn vestaĵojn. Judase, la rufharulo, estas tiel prezentata. Kaj por ni, jen kialo por miregi: precipe en la ĝermanaj provincoj sankta Jozefo surhavas kuloton kun horizontalaj

strioj. En tiu epoko li estas taksata ĝenulo, strangulo, eĉ marĝenulo. Eĉ en teatraĵoj oni lin ridindigas. Li aperas, kiel drinkemulo aŭ kadukulo. Oni devas ĝisatendi la finon de la XV-a jarcento, por ke li renobliĝu kaj fariĝu tiu, kiun oni honoras.

Kiel ofte okazas, la striokodo estas inversigita depost la fino de la mezepoko. Apud la aĉiga strio jen aperas alia, ĉi-foje pozitiva. fakte ĝi konsistigas provokon. Dum la granda pesto (1348) tiom da suferegoj trafis la homojn, ke la supervivintoj nepre volis ĝuadi la surteran vivon; La aŭdaca vestomaniero kompreneble ŝuldiĝas plejparte al la junularo

En Francio la fenomeno observeblas dum la XVIII-a jarcento. kaj ambaŭ kodoj paralele validas. Vertikalaj strioj por la aristokrataro, horizontalaj por la servistaro (oni memoru pri la veŝto kun strioj flavaj kaj nigraj, karakterizaĵo de la anglaj lakeoj dum la XIX-a jarcento). Tiu bonefika strio estas enkondukita de la usona revolucio: signo pri libereco, aliĝo al la novaj ideoj. Tiun ŝanĝiĝintan pensomanieron ilustras la jena ekzemplo. Fine de la mezepoko, zebroj, nebone konataj, estas taksataj diablaj pro siaj strioj; dum la XVIII-a jarcento Buffon dediĉas al zebro brilstilan paĝon. Li ĝin prilaudas kaj taksas la plej bela besto rilate al la felo.

Kiel jam menciite, kune kun la apero de la usona flago jen la strioj, simbolo de konkerota libereco. Tre frue ĉa 13 kolonioj, kontraŭ la angla krono ribelantaj, alprenas tiun insignon, kaj surflagan kaj survestan. Tiuj strioj, de la jaroj 1770-aj datiĝantaj, ankoraŭ brilas sur la usona flago. Supozeble la ribelintoj alprenis, kiel simbolon, la aĉigan veston de la sklavoj kaj karceruloj, kaj inversigis la kodovalorojn. Multaj landoj, kiuj dum la XIX-a kaj XX-a jarcentoj akiris sendependecon depostulis vertikalan striitan flagon.

Nia nuntempa socio daŭre funkcias per tiu duobla kodo. Eĉ aldonindas plia striosignifo: "Atenton!", "Malpermesite!" Haltu!", "Danĝeron!". Kompreneble tio koncernas la zebrostriajn trapasejojn kaj trafikokodon; Oni povus senfine prianalizi la striofenomenon sur aliaj kampoj. Mi preferefinu per arto kaj humuraĵo.

(sekvo sur paĝo 5)

DE NITO AL LUTO

Antaŭ ol ekzistis lutado, S-ro G. Eiffel kaj samtempoj konstruis pontojn, viaduktojn kaj la tutmonde famkonatan tricentmetrojn altan turon uzante nur milojn da nitoj. Eĉ ŝipoj estis konstruitaj tiel. Poste geniulo malkovris eblecon kunligi metalpecojn kunfandante ilin. Vera revolucio estis tiu eltrovado por la metal-konstruistoj.


La unuajn lutaĵojn faris forĝistoj. Ili varmigis metalpecojn per fajro en forĝujo. Je la taŭga temperaturo, la forĝistoj martelfrapadis la ardegajn pecojn ĝis konvena lutado. Tiel la forĝisto lutiĝis ĉefe ilojn (ekz. terkulturilojn) aŭ pecojn por industrio. Ĉefa maloportunaĵo en tiu lutmaniero estis la malfacila transport-ebleco.

Poste iu uzis gasojn por varmigi la lutotajn pecojn. Ĉefe acetileno, kiel brulebla gaso kaj oksigeno, kiu instigas la bruladon, estas uzitaj. Tra speciala aparato, nome oksiacetilena ŝalmo, oni ardigas la pecojn ĝis fandiĝo. La lutisto, per unu mano tenas la ŝalmon kaj, per la dua mano, aldonas la fandiĝantan metalon pere de nudaj dratoj. Tiel aldonante sam-esencan metalon, oni lutas la du pecojn. La gasbrulado samtempe protektas la fandiĝon kontraŭ oksidado. Malvarmigante, la du lutataj pecoj fariĝas unu-nura peco. Ankoraŭ nun tiu lutmaniero estas uzata precipe de plumbistoj. La valoro de tiu procedo estas la sufiĉe facila transportado kvankam la gasujoj estas pezegaj. Sed ne temas pri rapida lutmaniero. Ĉar la varmigo estas malrapida; la varmeko havas tempon disvastiĝi en la metalon, kiu sekve dilatiĝas kaj okaze de malvarmigo ne retrovas sian antaŭan volumenon. El tio rezultas disformiĝo de la lufita peco.

Pli poste malkovriĝis la ebleco uzi elektron por luti metalojn. Ekaperis la elektroarka lutado. Elektra arko estas okazigata de fuŝkontakto inter la lutotaj pecoj kaj la aldona drato. En tiu procedo la dratoj estas ĉirkaŭkovritaj de substancoj, kies komponaĵojn konas nur

la fabrikistoj, ĉefe koncerne la proporciojn. Tiujn dratojn oni nomas elektrodojn. La rolo de la ĉirkaŭkovritaĵo estas, unue protekti la fandiĝon kontraŭ oksidado per estiĝo de speciala gaso dum ĝia brulado, due direkti la fandiĝantajn metalerojn al la fandiĝo, trie superŝirmi la varmegan lutaĵon ebligante malrapidan malvarmigon. Ekzistas diversaj elektrodoj. Iuj ebligas la lutadon de konkava peco; iuj donas dikan lutaĵon, ĉar en la ĉirkaŭkovritaĵo ili entenas metalerojn krom drato mem. K.t.p. Ankaŭ diversdiametraj elektrodoj ekzistas: de 1 kaj 1/2-milimetra ĝis 8-milimetra. La plej uzitaj estas inter 2 kaj 1/2 ĝis 5-milimetraj. Estas uzeblaj alterna aŭ kontinua elektraĵoj kurentoj. Tiu lut-maniero estas sufiĉe rapida. Ĝi ebligas seriozajn ellaboraĵojn. Se ne estas elektra kurento en la laborejo ankaŭ eblas uzi benzinan aŭ dizelan motoron por funkciigi alternatoron, kiu produktos lut-kurenton.

Poste ekaperis la argono-lutado. Tiu procedo kunuzas erojn de la du antaŭaj manieroj, t.e. protektadon de fandiĝo per gaso, (kutime argono), kaj varmigo de la pecoj per elektra arko. Fakte en tiu procedo estas du procedoj nome T.I.G. kaj M.I.G., (tungsteno-inert-gaso, kaj metalo-inert-gaso.



En T.I.G. arko montriĝas inter la lutotaj pecoj kaj tungsteno. La aldoninda (ne devige) metalo venas mane el nuda drato. Ne rapidega lutmaniero, kiu ebligas ege fajnman laboron sur maldikaj aŭ sur dikaj pecoj. Kutime oni faras maldikajn ellaboraĵojn aŭ, sur pli dikaj, oni faras nur la unuan lutlaboron. Poste oni uzas pli rapidan procedon. Eblas luti rusteblan aŭ nerusteblan feron, aluminon, kupron kaj diversajn alojojn.

En M.I.G. la protektado de la fandiĝo estiĝas pere de gaso (argono, CO₂) . Arko fariĝas inter la lutotaj pecoj kaj la aldonotaj metaloj, sed, tiuokaze, la metalo aŭtomate venas en la fandiĝon. Tiu drato estas envolvita sur bobeno, kiu entenas 12 kilogramojn da metalo. La plej ofte uzataj diametroj estas 10/10, 12/10, 16/10 milimetraj. Tiuj dratetoj povas esti nudaj aŭ povas enteni pliajn protektilerojn.

Lutaĵo estas diverse kontrolita laŭ la kvalito-grado celita. Foje nur vid-kontrolo okazas. La kontrolisto devas ekvidi neniun malperfektaĵon. Poste oni povas kontroli la surfacon de la lutaĵo. Tion la kontrolisto faras dumaniere; la unua formo konsistas el uzado de du diversaj likvaĵoj. Unue oni ŝirmas la lutaĵon per penetrema ruĝa likvaĵo; post momento oni spongas la ruĝtuton; poste oni kvazaŭ farbas per blanka rivelilo. Se estas malperfektaĵoj, tiam ekaperas ruĝaj makuletoj. La dua maniero konsistas el la uzado de magneto-skopio; nome la kontrolisto farbas la lutaĵon blanka; due li ŝprucigas travideblan likvaĵon entenantan metaleretojn, kaj trie, per faka aparato sendas magnetan radion. Se ekzistas malperfektaĵo, tiam la metaleretoj enviciĝas sur ĝin. Venas iksaj aŭ gamaj radioj. Oni fotas la lutaĵon same kiel oni fotas homan brakon. Se, en malbona okazintaĵo oni ne povas foti, oni uzas ultrasonojn. Kompreneble, iaj etetaj malperfektaĵoj povas esti tolerataj, laŭ la kvalito petita.


Ĉiujare la lutistoj devas provi siajn lutkapablojn lutante diversajn pecojn el ladoj aŭ el tuboj, en diversaj pozicioj. Kutime radio-filmoj estas farataj. Foje estas distranĉitaj 5-centimetraj stangetoj, kiuj fakuloj eltiras per specialaj maŝinoj, por kontroli la rezistkapablon de la lutaĵo.

SANTERRE J. Y.

Sekvo de paĝo 3

Meze de la XIX-a jarcento ekas grafika tradicio: la desegnistoj tre lerte ludas per la striolarĝeco sur ĉemizoj kaj kostumoj por sugesti, laŭvice, la aĉularon kaj respektindajn socitavolojn. Nura striodikigo sugestas, kiel respektinda homo povas esti perceptata, kiel alarma homo. Post okulsigno al la ŝelkpantalono de forpasinta amuzisto (Coluche laŭnome), mi liveru anekdoton rilate al grandskala provokemulo Picasso. En vestobutiko jen li petas de la vendisto horizontale striitan pantalonon, por "zebrostrii al si la pugon" (tiel!) ĉar nur sub tia vestaĵo li scipovas kontentige pentri...

S. BONIOL



KVIZO

PSEŬDONIMOJ

PLUMNOMOJ KAJ KAŜNOMOJ

DE D-RO L.L. ZAMENHOF

(B. GOLDEN)

Dum sia vivo d-ro Zamenhof uzis almenaŭ dekon da fikciaj nomoj por kaŝi sian identecon. La plej bone konata estas "D-ro Esperanto", kiu servis kiel la nomo de lia internacia lingvo. Sekvas priskriboj de la cirkonstancoj, kiam dek aliaj nomoj estis uzitaj. Ĉu vi povas malkovri la fontojn? La nomoj, laŭ alfabeto ordo, estas: Aleksandro Naumann, Amiko, Anna R., D-ro X, Gamzefon, Hemza, Homarano, Homo Sum, N.N., Unuel.

1- Zamenhof uzis la plumnomon..... por subskribi ruslingvajn artikolojn temantajn pri progromoj, kiuj estis publikigitaj en la juda semajna gazeto "Razsvet". Per la sama nomo li subskribis ankaŭ la manuskripton de sia gramatiko de la jida lingvo, verkita inter 1879-1881.

2- La nomo datiĝas de la periodo 1882-1891, kiam d-ro Zamenhof subskribis per ĝi kvin poemojn, unu en pra-Esperanto, la aliaj en Esperanto. Inter ili estis origin-alaj kaj tradukitaj versoj.

3- La aŭtoro de la poemo "Al la Esperant-istoj" (1889) kaŝis sin per la nomo En la germana versio la subskribo estas "Ein Freund".

4- La kaŝnomo uzita por la grava traktaĵo "Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Internacia Lingvo", verkita en 1889, estas

5- La persona nomo servas kiel pseŭdonimo por tradukaĵo de unu el la fabeloj de Hans Christian Andersen, kiun Zamenhof publikigis en 1889.

6- La aŭtoro de Esperanto uzis tre nekutiman kriptonimon,....., por rusaj tradukoj de la "Dua Libro" kaj ties aldono en 1889.

7- La kaŝnomo, aperas en la ruslingva broŝuro kun la nomo "Hilelismo", eldonita en 1901.

8- Per la nomo Zamenhof subskribis leteron senditan, en 1906, al Louis de Beaufront por defendi homaranismon.

9- La kaŝnomo....., same kiel tiu en demando 7, estis uzita sur prireligia traktaĵo temanta pri homaranismo, publikigita en 1906.

10- La plej enigma el ĉiuj kaŝnomoj estas, kiu anstataŭas la aŭtoron en artikoloj pri la jida lingvo, publikigitaj en 1909.

RESPONDOJ:

1- Gamzefon. Ĝi estas anagramo de la familia nomo Zamengof, kiu, laŭ la rusa ortografio havas la literon "g" pro manko de "h" en la rusa alfabeto. Por deĉifri Gamfezon, oni simple rearanĝu la vicordon de la literoj.

2- Hemza Ankaŭ tiu ĉi plumnomo estas analizebla kiel parta anagramo, ĉar en ĝi troviĝas du silaboj de la nomo Zamenhof, "za" kaj "me", kaj ankaŭ la litero "h".

3- Amiko. Zamenhof uzis ĝin nur unu fojon. Ĝi probable estas mallongigo de la ofte uzata frazero ".amiko de nia afero" aŭ "amiko de l'lingvo internacia", kiuj signifas esperantiston.

4- Unuel. Ĝi estas mallongigo de la frazero "unu el ĉiuj" aŭ "unu el la esperantistoj".

5- Anna R. Ĝi estas la sola virina kaŝnomo uzita de Zamenhof. Ĝi aperas kiel la nomo de la tradukinto de la fabelo "La virineto de l'maro" de Hans Ch. Andersen.

6- N.N. La du literoj reprezentas la latinajn vortojn "nomon nescio", "nomon mi ne scias".

7- Homo Sum La du latinaj vortoj signifas "mi estas homo", kaj estas la enkonduko de vaste konata citaĵo de la romia dramaturgo Publio Terencio Afer: "Homo sum: nil a me alienum puto (Mi estas homo; mi rigardas nenion koncernantan la homon fremda al miaj interesoj).

8- Aleksandro Naumann. Sub la nomo de la subskribinto estis la vortoj "sekretario de la Unua Grupo Homarana". Al. Naumann estis esperantista poeto. Malgraŭ la uzo de tiu pseŭdonimo, de Beaufront rekonis la stilon kiel tiun de la aŭtoro de Esperanto.

9- Homarano. Zamenhof donis al tiu vorto la signifon "membro de la ĉiuhoma familio".

10- Dr X. Same kiel: la litero "x" en la matematiko estas "io nekonata; Zamenhof, en la revuo "Lebn u Visnŝaft" volis esti "iu nekonata".

LABIRINTOJ EN LA

OKCIDENTA KULTURO

La mita labirinto en Kretio kun ties simbolportaj ĉefroluloj: Dedalo, Tezeo kaj Ariadna, la terura Minotaŭro: jen figuro, kiu, de la Antikveco, hantadas ambaŭ filozofojn kaj artistojn. Sed, krom la naturaj grotoj, kie do troviĝas labirintoj? Sur multenombraj kampoj.

En nia korpo: la tutunua homsperto estas kvazaŭ labirinta, kiam naskiĝonto eltiriĝas el la patrinaj internaĵoj. Jam sur babilona tabuleto legeblas la esprimo "palaco de la internaĵoj". Ankaŭ niaj cerbo kaj orelo entenas labirintojn kaj dank'al la orelo ni scipovas vertikaliĝi kaj ekvilibre stari, kio nin distingas disde niaj primataj kuzoj.

En nia psiko: se, laŭ la helena mito, Dedalo parkeris la tutan implikitecon de la labirintaj planoj, la modernaj psikanalizistoj akceptas tute malsaman deirpunkton. Laŭ ili la paciento ne kapablas atingi la traŭmajn radikojn; tial li (ŝi) devas, kiel eble plej lerte elturniĝi por, laŭlonge de la vivjaroj, adaptiĝi al la eventoj kaj ĉagrenoj, laŭ siaj propraj kapabloj, laŭ logiko ne universala sed subjektiva, en rilato kun la konsekvencoj de tre fruaj forgesitaj perceptaĵoj, kies spuroj, kvankam ne retrafeblaj, influas la tutan psikon.

En pentro- kaj muzikarto: la ĉefroluloj de la mita labirinto inspiris la pentristojn, ĉu dum la XVI-a jarcento (Ariadna en la itala pentroarto), ĉu en la nuna epoko (la taŭra monstro kaj prezento de taŭrbataloj oftas ĉe Picasso). Parenteze ni aldonu, ke la labirinta fenomeno pensigas pri la spegulkabinetoj de la barokuloj, eĉ pri anamorfozoj, tiuj bildoj videblaj nur sub difinita angulo aŭ pere de alcelaj speguloj.

Se du niatempaj operoj (aŭtoroj: Richard Strauss kaj Paul Ducas) enscenigas Ariadnan, ja priplorinda estas la perdo de tiu verkita en 1608 de Claudio Monteverdi, kies unikan restaĵon konsistigas la fama koraĵa "lamento": samkiel labirintaj kurbigoj ĉiuj strofoj, kvankam similaj, iel malsamas.

Ni pli detale priskribu du labirinto-

specimenojn: la katedralan kaj la ĝardenan.

Kiam Okcidento kovriĝis per katedralaj ŝtonopuntoj, nigraj kaj blankaj labirintoj ekaperis sur la preĝejoj pavimoj. Pri ties deveno oni ne scias, ĉar nenie emblemoj senvualigis la misteron. Ĉu fare de la konstruintoj? Ĉu pro kristana kred-elano? Oni nur hipotezas. Ĉiel tiaj figuroj simbolas la vojon al pilgrimejo, ĉefe al Jerusalemo aŭ Santiago de Kompostel. Fakte la mezepokuloj titolis tiujn labirintojn "vojo al Jerusalemo" aŭ "loko de sankta Jakobo". La surpavimaj desegnaĵoj signalas kaj simbolas la vojon al animsavo, la vojon laŭirotan de tiu, kiu strebas atingi la kernon de sia personeco kaj kunfandiĝon kun la Unuo. Eĉ nun, ekzemple dum la festotago de Sankta Johano en Chartres, oni povas rigardi homojn surgenue laŭrantajn la plurjarcentjarajn kurbaĵojn ĝis atingo de la mistika centro. Tiurimede ili eksterigas la enan vojon, kiun ili decidis pene surtreti por sin direkti al la savo kaj saĝo.


Tiuj katedralaj labirintoj estas dudimensiaj, unuvojaj kun implikitaj kurbigoj, en- kaj el-irejo, centra loko.

Jen kuriozaĵo: notindas, ke kiam pilgrimanto iras de Flandrujo al Hispanujo, li rimarkas, ke de la nordo suden la labirintoj alprenas la sinsekvajn formojn kvadratan, pluredran, fine rondan, kio signalas la transiron, laŭlonge de la pilgrima vojo, de la tera mondo al la ĉiela, de la mondo de manifestiĝo al la mondo de Esenco.

Tute malsamcelaj la plezurlabirintoj en la barokaj ĝardenoj: apud Londono, en la belega parko Enghien, en italaj vilaoj proksime al Romo, en la pariza plantoĝardeno, ĝis... en la somerĝardeno de Pekino, fare de la italaj Jesuitoj.

Tiajn labirintojn konsistigas heĝoj kaj laŭboj kun artefaritaj grotoj, fontanoj kaj skulptitaj ornamaĵoj. Unu el la plej famaj situoj en Versaĵo. Ĝin desegnis Lenôtre kaj jene priskribis Charles Perrault: "En la labirinto troviĝas sennombraj aleetoj tiel implikitaj, ke preskaŭ neblas ne misvojiĝi. Sed krome, por ke la misvojiĝantoj povu agrable misvojiĝi, ne ekzistas kurbigoj, kiuj ne metas plurajn fontanojn samtempe antaŭ la okulojn, tiel ke ĉe ĉiu paŝo oni ekmiras pro iu nova objekto.". Sed Ludoviko la XV-a detruigis ĝin.

S. BONIOL



*En mia kastelo la esperantistoj
el la diversaj landoj sentas
ke ili estas ~~sen~~ en sia
propra lando.
Por mi estas la plej
bela rekompenco.*

H. M.

*(La fondinto de Esperanto-Domo
Gresillon naskiĝis en aŭgusto 1897. Li
mortis la 26-an de majo 1966. Pri li
kaj lia edzino aperos artikoloj en la
venontaj numeroj de nia revuo. Pri li
kaj lia edzino oni parolos dum la som-
ero en Gresillon. La suba artikolo aperis
en Kulturaj Kajeroj en junio 1966.)*

" Micard mortis". Tiu informo trairis Francion; eĉ la mondon. Ni ne estis surpriz itaj, ĉar de longe ni sciis, ke la malsano, sen iu dubo, forprenos lin; sed li estis tiel malcedema, eĉ tiel mense vigla, ke ni esperis. Pro tio lia forpaso estis neatendita.

Laŭlonge de sia vivo Micard batalis, rifuzis malvenkon. Jam la junulo volis paŝi malgraŭ longaj jaroj da senmoveco: li paŝis. En ĉiuj siaj entreprenoj li plene sindonis, ĉar li estis batalanto, militanto. sur la kampoj politika kaj sindikata. Aliaj parolos pri tiu aspekto de la homo ĉar mi mem ne sufiĉe konas ĝin. Mi parolos pri lia esperantista vivo, tiom plena. Tiu vivo fariĝis ĉefa dum jaroj. Li vivis ĝin tiel arde, ke li entuziasmigis homojn. Li postlasis profundajn spurojn en la esperantista mondo. Eĉ se herboj kaŝas ilin tiuj spuroj daŭre ekzistas. Unu el Ĥiuj spuroj, la plej bela, la plej daŭra, kiun eble neniu alia povintus postlasi, e' estas la Esperantista Kulturdomo. Kiu povus esti sufiĉe aŭdaca por sin ĵeti en tian aventuron? Aventuremo necesigas optimismon kaj obstinemon. Sukceso postulas energiplanan diplomatecan laboron. Problemo-plena estis la kolektado de mono, la serĉado de taŭga loko, la akiro de la bieno.. Same malfacila estis la vivo de la afero per malgrandega buĝeto. Amikoj helpis je la nasko de la "bebo". Sed Micard, konstante helpata de edzino ekster-ordinare sindonema, Micard, per persista laboro, energio, sperteco, homkono, enblovis la necesan spiriton, kreis la necesan forton postulatan por tia realigo. Per brakforto li tenis la Esperanto-Domon staranta kaj pruvis al la skeptikuloj, kiuj senmove spektis el la margeno, ke ĉio eblas, kiam

homo klare vidas sian celon, eĉ malfacile atingotan. Necesaj estis klarvido kaj kuraĝo. Micard ne malhavis tiujn. Li sperte esploris la korojn kaj la intencojn, ĉirkaŭiris la obstaklojn kaj decidis okaze de konflikto. Li plurfoje elektis la plej malfacilan vojon, ĉar li pensis, ke nur tiu vojo, foje dolora, kondukis al la celo. Dank'al siaj talentoj Micard sukcesis, post jaroj da konstanta strebado, krei organizon tutmonde konatan, kaj enmanigi ĝin, firme starantan, al geamikoj, kiam li sentis, la unuan fojon, ke li baldaŭ devos ĉesi batali. Li malakceptis senutilajn honorarojn; Li batalis por krei, ne por "karieri". Li ne volis konservi titolon, kiun li rajtis daŭre depostuli, kiam li ne plu kapablis plenumi oficon, realigi sian idealon.

Lia idealo estis homa frateco. Li sciis, ke oni ne rajtas peti de la homoj pli ol ili kapablas fari. Sed li estis konvinkita, ke ili kapablas doni pli ol ili mem kredas. Ili kapablas respekti unu la alian, ĝuste taksu la aliajn trans la limoj, la antaŭjuĝoj, la tradicioj. Oni nur donu al ili la rimedojn, la okazojn. Micard trovis rimedon: Esperanton. Li kreis la okazojn organizante somerrenkontojn dum jaroj ĝis la fono de kooperativa societo, kiu aĉetis lokon por tiuj renkontoj. Lia plej granda kontenteco estis aldoni ĉiujare kelkajn brikojn al sia kreaĵo, vidi ĝojon sur la vizaĝoj de la ĉeestantoj, konstati la naskiĝon de novaj amikaj sentoj. Li rajtis fieri por tiu unika realigaĵo. Sed li neniam trumpetadis pri siaj faroj. Li nur informis pri la Esperantista Kulturdomo, pri kio ĝi estas, pri kio ĝi proponas, sen blufi.

Viro, kiel li, ne malaperas. Li ne forviŝiĝis el la koroj, el la memoroj nek el la spiritoj. Gresillon staras, kiel stelo starigita, kiel memoraĵo, loko kie tiuj, kiujn li fidis zorgos pri la pluvivo ankau de lia idealo.

P.B.

MALPERMESITA AMO

(ĉerpaĵo el novelo de Aleksandro Mollison)

La historio ĝis nun: Edvardo Krab kaj Olivia Fraser amas unu la alian. Tamen ili estas tre junaj. Edvardo havas deksep jarojn sed Olivia nur dekkvin. La patrino de Edvardo, vidvino laŭ si, kaj la gepatroj de Olivia forte kontraŭstaras la proponon, ke ili geedziĝu.

Andreo kaj Manjo Fraser sidis en la luksa salono de sia hejmo kaj argumentis kun sia filino Olivia. Ŝajnis, ke ĉiuj punktoj kiujn ili jam longe diskutis, venis al neniu konkludo krom tio: Olivia devus ĉesigi pensadon pri edziniĝo. Andreo Fraser, estro de banko en la urba centro, estis distinginda viro, alta, elegante vestita. La edzino, Manjo, ankaŭ alta estis, svelta kaj brunhara kvankam la koloro de la haroj ŝuldis pli al la frizistino ol al si mem.

"Por la centa fojo, Olivia," diris ŝia patrino, "la afero estas precipe pri aĝo. Vi estas multe tro juna por konsideri edziniĝon. Vi jam diris, ke tiu Edvardo Krab ne havas laboron; Li estas tutekomprenebla same kiel vi." Ŝi tiris la fingrojn unu post la alia en nervoza reago al la disputado. Andreo Fraser rigardis de filino al edzino kaj ree al Olivia. "Mi konsentas kun via patrino, Olivia. Ĉiuokaze vi renkontos multajn junulojn ĉe la universitato, kiam vi komencos la unuan trimestron. Kaj memoru, ke bakalaŭro havas pli bonan ŝancon trovi postenon dum ĉi tiu depresio." - "Mi ne volas bakalaŭrecon," ploretis Olivia, "mi volas edziniĝi al Edvardo." La gepatroj rigardis unu la alian konsternite. Ili konstatis, ke la aferon ili ne kapablos facile rompi.

Dum Olivia Fraser argumentis kun siaj gepatroj, simila, eĉ pli arda, batalo furiozis en la hejmo de Edvardo. "Edvardo mi jam diris al vi," kriis la patrino, "mi ne parolos plu pri ebla edziĝo via. Vi devas fini viajn studojn." Ŝi komencis uzi virinan taktikon, eksplorante kaj viŝante siajn okulojn per poŝtuko. "Jen mi! Mi estas kompatinda vidvino, kaj mi oferis ĉion por eduki vin, por ke vi havu la plej bonan ŝancon en la mondo. Ne forĵetu tion!" - "Sed mi ne

forĵetos, panjo. Kaj vi mem edziniĝis, ĉu ne? Vi ĉiam diris al mi, kiel nobla estis mia patro. Mi deziras esti kiel li. Mi volas protekti Olivia'n. Mi estas certa, ke mi povos fari tion." Raĉel rigardis lin kun pli kaj pli da ĝeniĝo. "Edvardo, mi ne ofte ordonas al vi. Sed mi devas ordoni nun. Vi devas rezigni pri ĉi tiu knabino. Mi...mi malpermesas al vi vidi ŝin denove." Edvardo malfermis la buŝon por paroli sed ne kapablis. Li ne povis kompreni. Lia patrino estis tiel afabla. Ŝi neniam parolis al li tiamaniere.

"Patrino", li diris rezolute, "Olivia kaj mi jam decidis. Ŝia deksesna naskiĝ-datreveno okazos fine de novembro. Ni geedziĝos je Kristnasko ĉu ni havos vian permeson kaj la permeson de ŝiaj gepatroj, ĉu ne."

Raĉel stumblis al fotelo kaj sidiĝis. Ŝi gestis al sia filo. "Edvardo, sidiĝu mi petas. Estas io grava, kion mi diru al vi." Ŝi flanken rigardis kaj hezitis sufiĉe longe por ke li sidiĝu. "Mia filo, vi ne rajtas edziĝi kun Olivia Fraser." - "Kial ne?". Edvardo nun koleriĝis, opiniante, ke ĉiuj kontraŭstaras ĵunan amon. "Aŭskultu mia kara." Raĉel tordis la poŝtukon en siaj manoj. "Vi ne rajtas edziĝi al Olivia Fraser ĉar... ĉar ŝi estas via fratinino."

Edvardo gapis al sia patrino, taksante la vortojn sed ne komprenante. Li malfermis la buŝon sed Raĉel silentigis lin per levo de la brako. "Vi kaj Olivia havas la saman patron, Andreo Fraser." Edvardo rigardis ŝin tute ŝokite. "Sed tio ne eblas. Vi diris, ke mia patro mortis, kiam mi estis nur bebo." - "Mi devas peti pardonon, Edvardo. Mi ne diris al vi la veron." Ŝi rigardis sian filon kun malĝoja mieno. "Mi estis amorantino de Andreo Fraser kaj vi estas lia filo. Ni ĉesigis nian aferon antaŭ multaj jaroj. Kiel vi scias, Olivia estas la unu nura infano de Andreo kaj Manjo Fraser. Vi kaj Olivia estas proksimaj parencoj kaj oni malpermesas geedziĝon en ĉi tiu cirkonstanco."

Edvardo restis silenta dum kelkaj minutoj. La cerbo kirliĝis, kiel turbo. Per raŭka voĉo li fine flustris: "Vi diris, ke mia patro estis nobla viro. Vi diris, ke li volus vidi mian progreson en mia edukado." Lia voĉo plilaŭtiĝis. "Vi diris, ke se li vivus li certe plezuriĝus pro mi."

NIAJ POETOJ


STULTAĴO

Li stariĝis kaj pugnigis siajn manojn kaj laŭte kriis: "Sed li neniam venis al mi. Li ignoris min. Li taksis min, kiel nelegitim-itan infanon;" Li forte spiris kaj paŝis tien kaj reen, kiel enkarcerigita sovaĝa animalo. "Vi diris, ke li estis nobla. Li ne estas. Li estas rato, haladza rato, kiu seksatencis junulinon." - "Edvardo!". Raĉel nun ĉagreniĝis pro la triviala lingvo de sia filo. "Ne parolu tiel. Mi volonte amoris kun via patro. Ni estis amantoj. Mia kara. Akceptu la situacion." - "Akceptu! Akceptu! Kio estas por akcepti? Mi ne rajtas edziĝi al la plej bela junulino en la mondo, kaj mi ĵus trovis, ke mia patro estas fripono, maldeca malpura, fetora fripono. Kaj mi estas nelegitimita, bastardo! Fi! Fi, al ĉio tio ĉi!"

Raĉel rigardis tute konsternite dum ŝia filo kolere foriris el la ĉambro, krakfermante la pordon post si. Ŝi sidis tremante, ĝemante pro malĝojo. Ŝi mensogis nur por protekti sian filon, aŭ tiel ŝi diris al si; sed, honeste, ŝi devis konfesi, ke ŝi mensogis por protekti sin mem.

Subite estis eksplodbruo de la supera etaĝo. Raĉel Krab stariĝis malrapide. "Ne! Ne!", ŝi kriis. La tirata krio sonis tra la tuta domo: "ED...VAR...DO!".

(La libro de A. Mollison el kiu la supra teksto estas ĉerpita estas havebla ĉe nia Libro-Servo.)



En oper' kantis kun brilo
pri " barbiro de Sevilto "
senharul' ve, ironio !
tio estis " kalvario ".

Poet' instruis pri ludo
kaj tre plaĉis tiu studo
al la muzo.
jen " amuzo ".

Kvar sezonoj en unu jar'
estas tre mallogike ĉar
se jar' havus ses sezonojn
ĝi havus ses " sesonojn ".

Kok' kantas ĉe l'sunleviĝo
ĉe ĝi, tio estas rito
sed ĝi perdas pri prestiĝo
se ĝi fariĝas " kokrito ".

Ĉar pul' suĉis ŝian sangon
li gratis ŝian sidvagon
ŝi do dankis kun gratulo
al la afabla " gratulo ".

Lasta urbo ĉe Luaro
estas Nanto
ĉar ne logas min la maro,
nu, mi restu " eksternanto ".

MARCELO

LA SEKRETO DE LA REĜINO

(FINO)

La homo sur la perono saltis en la vagonon kaj sidiĝis peze en la angulo kontraŭ ŝi. La aventuro komenciĝis denove. Ili ambaŭ prenis grandan bileton unulinian.

Homoj veturantaj al teatroj aŭ kinoj plenigis la vagonon en la urbo; la lumreklamoj ree fandiĝis kun la penetrantaj tonoj de klaksonoj. Denove ni interŝanĝis homojn apud la stacidomo kaj la okan fojon ni troviĝas inter la konstruaĵoj de forte lumigitaj vagonejoj apud la arsenalo.

Mi timis, ke mi faros ian sensencaĵon, tiel ekscitita mi estis la tutan vojon. Ĉi tie jam estis nur nemulte da homoj kaj tiuj du sidas unu kontraŭ la alia. Ŝi komencis aspekti senespere. Ŝi petis lin per la okuloj, ke li lasu ŝin. Tio estis pli klara ol se ŝi estus pete plektinta la manojn. Sed en tiu rigardo estis ĉiam kaj ĉiam samtempe iom pli multe. Ŝi diradis al li, ke ŝi havas nenion kontraŭ li, ke ŝi estas kortuŝita, ke ŝi lin ŝatas. Kaj tion ĉi mi ekkonis, mi, kiu povis dum mia laboro sole de tempo al tempo alstrabi al la stranga duopo! Kaj kiu scias ĉion, kion ŝi tiel diris al li, kiam mi ne rigardis!

Mi proponis al mi, en la fina stacio, apud la arsenalo, alporti refreŝigajn gutojn – tuj malantaŭ la angulo estas apoteko. Ŝi dankis sed ne akceptis. Ŝia gardanto promenis sur la perono. Diversaj pensoj venis al mi en tiuj liberaj momentoj; eble li estas sekreta policano kaj li persekutas aventuristinojn de eŭropa formato. Sed tiam li povus aresti ŝin tuj. Estas do sensencaĵo.

Mi fajfas. La viro ensaltas kaj peze sin lokas en la angulon. Ni veturas reen. Apud la infanteria kazerno eniras revizoro. Estas Brejcha, loĝanta en Strato de Paco, kiel mi. Mi sentas, ke mi ion fuŝis en la registro de venditaj biletoj; mi faris ja ĉion, kiel en sonĝo. Li frapetis je ĝi per krajono, inspektis la biletojn, la biletojn de la pasaĝeroj, revenis al mi kaj diris flustre:

"Kaj tondigu viajn harojn malantaŭe sur la kolo kaj malantaŭ la oreloj. Kaj razu vin ĉiutage!" – "Jes, jes" mi respondis rapide kaj estis dankema al li, ke li tion diris tiel flustre, ke neniu povis ĝin aŭdi. Estis malfrue. La neonlampoj estingiĝis kaj la stratoj senhomiĝis.

Depost la stadiono ni estas tri en la vagono: ili du kaj mi. Ŝi ekrigardas kelkfoje la horloĝeton kaj ĉiam ektimiĝo skuas ŝiajn lipojn. Kompreneble, virinoj kiuj iras je la sepa al vespermanĝo, povas havi sufiĉe da timo post la naŭa, se ili ankoraŭ ne estas hejme. Mi rimarkas, ke subite ŝi rigardas lin kun tiel terura angoro, ke, embarasite, li ekstaras kaj konfuzite balanciĝas al la malantaŭa platformo, tie sin apogas, plue rigardas, deprenas la ĉapelon, frotas al si la frunton, ree surmetas la ĉapelon kaj ektusas en eksterordinara ekscitiĝo. Tiam mi vidas, ke la fraŭlino, subite en la senespera decidiĝo mansignas al mi. Mi forlasas la viron sur la platformo kaj staras antaŭ ŝi. "Vi bonvolas?" – "Diru, mi petas, al la sinjoro, ke li foriru. Ke li foriru! Diru, mi petas, diru, ke li estu tiel afabla kaj foriru!" – "Volonte", mi diris, kaj salutis ĉape. Mi foriras al li kaj flustras tion al li en la orelon. Tuta li kvazaŭ kaŭriĝas en sin kaj paliĝas. "Ĉu tion ŝi diris?" li flustras. "Kiel ŝi tion diris?" – "Ŝi diris," ripetas mi, "ke vi estu tiel afabla ke vi foriru. Dufoje ŝi ripetis tion". – "Jes, vere," li balbutas konfuzite. Diru al ŝi afable, ke ŝi pardonu; ke mi tuj foriros. Ŝi pardonu. Diru al ŝi, ke ŝi senkulpigu min, ke mi estis tia maldelikatulo." – "Volonte", diris mi. Li min kaptis je la ŝultro, apenaŭ mi ekiris, kaj trenis min reen. Mi vidas, ke lia viktimo rigardas min. "Diru alie. Petu, ke ŝi tuj diru al vi, ĉu ŝi pardonis min. Mi elvagiĝos tuj."

Mi iras; iom mi klinas al ŝi kaj flustras tion al ŝi. Ŝi fermas la okulojn, apogas sin peze kaj dankas al mi. Mi pensas, ke ŝi svenos. Sed ŝi refortiĝas. Mi diru al li, ke ŝi neniom koleras. Eĉ ne iomete. Sed ke li foriru. Mi tion diras al li. Mi rifuzas la trinkmonon.

Ni haltas en la antaŭlasta haltejo. La viro elvagiĝas rapide kaj staras en la densa mallumo de la kaŝtanealeo, izole sola homo en la vasta regiono de tiu senhoma kvartalo. Mi fajfas kaj ni ekveturas.

Kaj tiam, mi tion ĵuras, la virino sin turnas subite al la fenestro kaj rigardas en la mallumon. Ŝi deprenas rapide ganton, premas fingrojn al siaj lipoj kaj metas ilin firme al la fenestro.... Ĉu kison ŝi sendis al li?

Ŝi vokas min. Ion ŝi diras al mi, ektuŝas mian manon. Superfluas min sento de silenta feliĉego kaj dankemo. Nur nun mi sentas, ke ŝi donas al mi bankbileton. Mi malakceptas la monon tre ĝentile kaj profunde salutas. Mi revenas al la malantaŭa platformo. Ni estas ĉi tie solaj. Mi registras la venditajn biletojn. Ne, ion tian mi ne povas kompreni; ne, tion mi absolute ne komprenas. Dum tri horoj daŭris tiu ĉi frenezaĵo, por nenio. Mi sentis bedaŭron pri tiu frenezulo, kiu staris, kiel kolono, tie sub la kaŝtanoj. Ŝi estus nenion perdinta, ŝi, reĝino, se ŝi estus lasinta al li iom da ebleco, la kelkajn paŝojn de la stacio al la vilao.

Kaj ree ni veturis inter la vagonejoj de la lasta stacio apud la areno. La vagonoj haltis kaj la reĝino stariĝis per fier, majesta movo, elvagoneiĝis kaj estis foriranta, tute sola. Kaj en tiu momento fariĝas videbla la sekreto de la reĝino.

Ŝi estas lama.

Edvard VALENTA



ĈU VERE ?
VI NE POVAS
PAGI ABONON ?

Tre konata vojaĝemulo prelegas pri siaj spertoj. "En Ĉinio, mi konstatis vere strangajn kutimojn. Ekzemple, kiam riĉulo estas kondamnita al morto pro iu krimo, li rajtas savi sian vivon pagante altan sumon al anstataŭanto. Tiu kutimo alportas vivrimedon al malriĉuloj."

Du laboristoj promenas, ŝajne sencele, sur la labor-loko. "Kion vi faras?" demandas la ĉeflaboristo. "Ni portas tiujn brikojn al la alia flanko de la loko", ili respondas. "Kiujn brikojn?" - "Vidu", diras unu el la laboristoj al la alia, "ni forgesis la brikojn!"

Iu laboristo freneze laboras. Ĉiun duan minuton li grimpas per ŝtupetaro portante pezan brikaron. Post unu horo kamarado demandas lin, kial li tiel forte laboras. "Oh! Ne diru ion ajn al ili. Mi trompas ilin. Fakte mi ne laboras. Ĉiufoje mi portas la saman brikaron!"

Maljunulo stumblas kaj falas sur strato en Dublino. Tuj grupiĝas homoj ĉirkaŭ li. Ĉiu proponas rimedon por revivigi lin. Iu maljuna virino diras: "donu al li iom da viskio". Neniu aŭskultas ŝin. Post kelkaj minutoj la falinto malfermas siajn okulojn kaj diras "Anstataŭ senorde babili, silentu kaj aŭskultu, kion diras tiu afabla, kompetenta sinjorino!"

Sinjoro eniras la salonon de kombisto. Li gvidas knabeton per la mano. Kiam la kombisto finis sian laboron pri la sinjoro, ŝampuadon, tondadon kaj razadon, la sinjoro sidigas la knabeton en fotelon kaj diras: "Mi tuj revenos; mi nur deziras aĉeti cigaredojn. Bonvolu zorgi pri lia hararo." La kombisto pritondas la kapon de la knabo kaj atendas. La sinjoro ne revenas. "Ŝajnas, ke via patro forgesis vin" - "Li ne estas mia patro; nur viro, kiu diris al mi: "Venu kun mi. Ni senpage refreŝigos niajn harojn!"

Sinjoro eniras restoracion. Li mandigas al la kelnerino kaj mendas bifstekon, salaton kaj flateme aldonas "...kaj afablan vorton". La junulino revenas kelkajn minutojn poste kun la menditaĵoj. "Dankon fraŭlino", diras la sinjoro, "sed mankas la afabla vorto". La kelnerino flustras en lian oreilon: "Ne manĝu la bifstekon".

NIA KONKURSO

POR VIA DISTRO

Ĝi konsistas el 6 enigmoj, kiuj aperos en Kulturaj Kajeroj en tri sinsekvaj numeroj. Vi povas tuj sendi viajn solvojn al la redakcio, aŭ konservi ilin kaj sendi la ses solvojn en la fino de la konkurso. La respondoj estos akceptitaj ĝis unu monato post la apero de la du lastaj enigmoj.

Gajnos la 1-an premion, 1 000-frankan stipendion por restado en Gresillon, tiu kiu ricevos plej multe da poentoj.

La 2-a premio konsistas el 500-franka stipendio por restado en Gresillon.

La 3-a premio konsistas el 250-franka stipendio por aĉeto de libroj el nia Libro-Servo.

5-a enigmo (12 poentoj) – 1. Iu muzikpeco elvokas Granada, Catalana, Sevilla, Cadiz. Trovu la ĝeneralan titolon kaj la komponiston de tiu verko.

2. Kiu poeto skribis: "Lasu min longe, longe spiri la odoron de viaj haroj, enigi en ĝin mian tutan vizaĝon... Se vi povus scii ĉion, kion mi vidas... Mia animo vojaĝas sur la parfumoj, kiel la animoj de la aliaj homoj sur la muziko" ?

3. Tiu poemo inspiris francan komponiston. Diru lian nomon kaj la titolon de la koncerna muzikaĵo.

4. Kiu komponis "Vaska rapsodio" ?

5. "Epifanio" estas la titolo de muzikaĵo verkita por violonĉelo kaj orkestro. Donu la nomon de la komponisto.

6. En 1884 Claude Debussy gajnis la Grandan Roman Premion pri muziko. Kiu el liaj komponaĵoj havigis ĝin al li ?

7. Kiu estas la subtitolo de "La sorĉista amo" de M. de Falla ?

8. Kiu estis Stenka Razin ?

9. Kiu verkis muzikaĵon kun tiu titolo ?

10. Inter la verkoj de Vincent d'Indy, unu havas nomon de floro. Ĉu vi povas ĝin trovi ?

6-a enigmo (10 poentoj) – 1. La unuaj historiaj mezepokaj verkistoj uzis la latinan lingvon. Kiu kronikisto unua uzis la francan ?

2. Nomu la tri sekvantajn kronikistojn.

3. "Kiu por la lando mortas, eterne vivas". Kiu skribis tiun version, kaj en kiu teatraĵo ?

4. " Ĉio estas superbela en ŝia hejmo, eĉ aparta: la lampoj estas malsimilaj de la aliaj lokoj; ŝiaj kabinetoj estas plenaj je mil raraĵoj, kiuj montras la guston de tiu, kiu ilin elektis; la aero ĉiam estas parfumita en ŝia palaco; diversaj belegaj korboj, florplenaj, faras eternan printempon en ŝia ĉambro." Pri kiu oni parolas en tiu teksto ?

5. Kiam okazis la unua oficiala kunveno de la Franca Akademio ?

6. Kiom da membroj estis tiam ?

7. Kiu skribis: "La eterna silento de tiuj senlimaj spacoj timigas min" ?

LA VIVO EN GRESILLON

RAKONTO

"S-ino L. ? Vi memoras, ke venontan semajnfino okazos en la kastelo kunveno de la Komitato ? Sabaton, dek du personoj vespermanĝos. Mi alportos malvarman viandon, sed bonvolu prepari supon por ĉiuj" – "Per legomoj ? – "Kompreneble." – "Kiom da supujoj ?" – "Ŝajnas, ke kvar sufiĉos. Pri la legomoj mi fidas vin. Se estos iu ŝanĝo mi denove telefonos al vi. Ĝis sabato. Ni alvenos unu horon antaŭ la manĝo."

Sabaton. Fine de la posttagmezo.. La bieno silentas. Ĝis nun ankoraŭ neniu el la komitatanoj alvenis. Sed post duonhoro, verŝajne, konversacioj bruos. Je la sepa kaj duono ĉiuj sidos en la manĝoĉambro. Espereble la kuiristino jam zorge laborasĉe la forno.

..... "Saluton, sinjorino. Ĉu ĉio estas en ordo ? Neniu problemoj ?" – "Ne" – "Ĉu la supo estos baldaŭ preta ?" – "Jes". Kutime S-ino L. estas babilema. Ni ordigas la diversajn aĵojn, kiujn ni alportis. Ŝajnas, ke io ĝenas ŝin. Ŝi staras apud granda poto kaj tenas per la du manoj longstangan miksilon, kiu laŭte bruas. Kial tiel granda poto por nur dduo da manĝontoj ? Kutime tian poton oni uzas por pli ol kvindek ĉeestantoj. "Kial vi prenis tiun poton ?" – "Kio ?" – "Kial vi ne uzis malpli grandan ?" – "Ne sufiĉas". – "Vi estas certa ? Vi provis ?" – "Jes". Ŝi ne rigardas nin, nur en la poton. Ŝi firme tenas la miksilon. kiu gaje bruas.... Venas al ni demando: ĉu ŝi teneas la miksilon ? Ĉu la miksilo tenas ŝin staranta ? Ŝajnas, ke S-ino L. iom ŝanceliĝas. Fininte nian ordigon ni alproksimiĝas al la triopo. Nur la poto senprobleme staras. La stango de la miksilo iom balanciĝas. Ankaŭ la kuiristino, kiel staranta dormanto. Ĉu S-ino L. dormas ? Ne. La poto estas preskaŭ plena de akvo en kiu naĝas neprecizaj, diverskoloraj aĵetoj. "Kion vi faris ?" – "La supon" – "Kie estas la legomoj ?" – "En la supo." – "Sed vi metis tro da akvo!" – "Ne, kiom vi diris." S-ino L. levas la rigardon... kaj stumblas du paŝojn malantaŭen. La miksilo montras neatenditan utilon. Ne dubeble S-ino L. estas ebria. Ni sidigas ŝin sur seĝon kaj tra nebulaĵ klarigoj fine komprenas la misteron de la poto. Ni diris al ŝi, ke ŝi preparu kvar supujojn por dekdu personoj. Ŝia ebriulina cerbo tradukis: dekdu supujojn kaj legomojn por kvar!

La ĝardenisto, simpatia, bonvolema viro estis la edzo de la kuiristino. Li multe laboris. Neniam antaŭe la ĝardeno aspektis tiel bonorda. Bele rastitaj longaj bedoj kun aleoj, kiuj ebligis facilan ĉirkuladon. La randoj de la bedoj estis iom pli altaj por reteni la akvon. Tiamaniere akvumado plene efikos. Ĉe la ekstremo de ĉiu bedo staris stangeto kun surpapera indiko: "fazeoloj", "salatoj", "brasikoj", "karotoj", ktp... "Ni rikoltos ĉiujn legomojn necesajn por la somero". – "Gratulojn s-ro L. Ne forgesu akvumi ĉar vi scias, ke la grundo tie estas seka kaj ne tre fekunda." – "Ne timu. Mi estas profesiulo!" Fakte tion asertis la antaŭaj gemastroj de la paro... Kaj la ĝardeno estis regule akvumita

Sed S-ro L. opiniis, ke akvo taŭgas por plantoj, ne por homoj. Ni estis do devigataj maldungi la edzon samtempe kiel la edzinon. por eviti gravajn problemojn dum la somero. Eble vi diros, ke tamen restis la legomplena ĝardeno! Ankaŭ ni konsoliĝis dank'al tiu espero. Sed, post kelka tempo ni konstatis, ke nenio kreskis en la ĝardeno, krom sovaĝaj herboj. Ŝajnas, ke la zorge preparita grundo neniam ricevis ian ajn semon. Kvankam ni poste ricevis fakturon pri aĉetitaj semoj. Kies ĝardeno estis prisemita ? Laŭdire tiu de iu trinkejestro, kiu tiamaniere ricevis pagon de ies trinkaĵ-ŝuldoj.

LIBRO-SERVO

Jen kelkaj sugestoj por viaj jarfinaj donacoj:

- 1) al infanoj: Kapti ŝteliston (14 f.) – Pesi elefanton (14 f.)
Asterikso kaj la Normanoj (60 f.)
- 2) al plenkreskuloj: Bagatelaro (45 f.) – Brava soldato Ŝvejk (35 f.)
La verda koro (35 f.) – Mistero minora 65 f.)
Nobela novelaro (37 f.) – Marianne (37 f.)

Ne forgesu ankaŭ la poŝtkartan kalendaron 1997 (1,50 f.)

Mendu de S-ino J. VINCENT, 26bis, rue de Milngavie FR-49150 BAUGE

NE sendu monon; atendu la fakturon.

NIAJ PERKORESPONDAJ KURSOJ

POR LA KOMENCANTOJ: Kurso per mem-korekta metodo. Tiu metodo ebligas progresadon adaptitan al la ritmo elektita de la lernanto, kiu, paŝon post paŝo, korektas mem siajn erarojn. Testo-folioj sendotaj al la korektanto ebligas kontroilon. La korektanto tiam atentigas la lernanton pri la lingvaj punktoj ankoraŭ ne bone asimilitaj.

La prezo de tiu kurso estas: 200 fr. fr.

POR LA PRAKTIKANTOJ: por akiri la praktikadon de la lingvo. Ilustrita kurso, tekstoj, gramatikaj rimarkoj, taskoj sendotaj al korektanto.

La prezo de tiu kurso estas: 200 fr.fr.

SUPERA KURSO: De- kaj al-tradukoj, atentigoj pri gravaj gramatikaj punktoj, ĉefaj eroj de la historio de Esperanto. Bona preparado al la Atesto pri Kapableco.

Prezo de la kurso: 150 fr.fr.



Mi pagis mian abonon
ĝustatempe.
Kaj vi?

al P. Baĥin, poŝtkonto Nantes 281361L
aŭ al via peranto: vidu liston sur la
lasta kovrilpaĝo

GRAMATIKO PER BONHUMORO




ANTO - INTO - ONTO

TIUJ VERBAJ SUFIKSOJ montras personon :

- **Kiu -hodiaŭ — agas** (anto -as)
la leganto laŭvoĉe legas
- **Kiu -hieraŭ — agis** (into -is)
la kongresintoj jam revenis.
- **Kiu -morgaŭ — agos** (onto -os)
la vojaĝonto frumatene foriros.

RIM : ja, oni povas apudmeti diverstempajn agojn :


- la leganto morgaŭ aĉetos samaŭtoran libron.
- la ekskursintoj, lacaj, hodiaŭ ripozas.
- la vojaĝonto hieraŭ fruvespere endormigis?



Laŭ vi, karulo, kiu estas la gajnonta piediranto ? Felice mi estas lerta stiranto.



Reĝo de grumblantoj ! Preskaŭ ĉiuj aŭtoj estas akcident-suferintoj !



S-ro policano ! Aŭto staras sub la panelo " malpermesite parki ". Ŝajnas, ke la kondukinto estas nia prof'.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Belgio : Librovendejo Kariljono, vzw Doornstraat 22. 2610 Wilrijk Akceptas kreditkartojn - prezo : 600 BEF.

Britujo : John C. Rapley, 17 The Grange, Shepherdswell, Dover, Kent CT 15 7 Q B. (10 pundo)

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 krono)

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).

Germanujo : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frar (M. 2759 35-609) (25 D.M.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10*-D 03003 ALICANTE - (1 700 pe

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura (20.000 liroj).

Japanio : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôziŝi TO

Jugoslavio : Jelena Andjelkovic, Nova 61/1, YU-11213 Beograd

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugalio : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboa (2.800 esk.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).

Svislando : Esperanto Perkoresponde, Claude Gacond, strato Chevreuils 14, CH-2300, La Chaux-de-Fonds, PK.23-4669-1 (22 s.f.)

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfera frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra cent-rokcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponeto al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34